# FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

Organo de FRANCA LIGO DE KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ, filio de IKUE

========= LA HOUSSAYE-EN-BRIE (Seine-et-Marne) FRANCE ==============

=================================================================

Redaktoro : S-ro Gaston VERON, pl. de la Petite Bruyère, DOMFRONT (Orne)
Sekretario : S-ro Jean BARRIER, 89, rue Roger Salengro, DRANCY, (Seine)
Help-sekretariino : F-ino LE BOEDEC, 18, rue Ernest Cresson, PARIS -14-
Kasisto : S-ro J. LIGOT, 30, rue Fernand Segouin, ARNOUVILLE-les-GONESSE
C.C.P.- PARIS - 51 74 79 - (Seine-et-Oise)

Abonnement : 2 Fr-, Adhésion à la Ligue : 1 Fr-; Total = 3 Fr--

-N° 66 --- BULLETIN TRIMESTRIEL --- TRIMONATA BULTENO ---------

Sankta PIO X-a, preĝu por ni. +++ Julio 1965 +++

ENHAVO :

- La Dia Amo. = 1 -
- Vortoj de l'Papo. = 2 -
- Bileto de la Prezidanto. = 2 & 3 -
- Ĝenerala Kunveno. = 4 & 5 -
- La Dominikaninoj de LOGELBACH. = 5 -
- Medito por la ferioj. = 6 -
- Familiaj novaĵoj. = 3 -

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

## LA DIA AMO.

... Klinu vian orelon, kaj venu al Mi; aùskultu, por ke vivu via animo; kaj Mi faros kun vi interligon eternan pri la fidindaj korfavoroj, promesitaj al David./

( el Jesaja 55, 3-)

... Car mi konvinkiĝis, ke nek morto, nek vivo, nek angeloj, nek aùtoritatoj, nek estantaĵoj, nek potencoj, nek akteco, nek profundeco, nek iu alia kreitaĵo povos apartigi nin de la amo de Dio, kiu estas en Kristo Jesuo, nia Sinjoro./

( el Romanoj 8, 38-39- )

=================================================================

+++++++++++++

# ~ - VORTOJ de l' PAPO. ~

Estu ĉiam fidelaj al la vero; ne forgesu vian respondecon kontraŭ la publiko kaj ankaŭ la historio. Ni konfidas al vi nian specialan mesaĝon al la mondo. La nacioj ĉesu la kuradon al la armado kaj ili kompense dediĉu siajn povorimedojn kaj energiojn por frata helpo al la ekevoluiĝantaj landoj. Ĉiu nacio, havanta pensojn ne por afliko kaj milito sed por paco, dediĉu almenaŭ parton de siaj pormilitaj elspezoj al impona tutmonda fonduso por solvi la multnombrajn problemojn, kiuj ekzistas por tiom da malfavoruloj pri nutrado, vestado, loĝado, kuracado.

De la paca altaro de la Eŭkaristia Kongreso, iru nia angora alvoko ĝis ĉiuj registaroj en la mondo kaj Dio inspiru ilin, por ke ili entreprenu tiun pacan batalon kontraŭ la suferoj de iliaj malpli riĉaj fratoj.

( Parolado al la ĵurnalistoj en Bombay)

---

# ~ Bileto de la Prezidanto ~

Notre assemblée générale annuelle s'est tenue à Paris, et nous avons pu constater que nos membres, unanimes ou presque, renouvelaient leur confiance aux membres sortants du Comité.

Cependant nous aurions aimé qu'un nouveau courant s'amorce, qu'une relève se dessine, permettant aux militants depuis longtemps à la tâche de se décharger de leurs responsabilités, et offrant à de plus jeunes l'occasion d'apporter des idées neuves, de donner à notre Association des bases plus vivantes, plus efficaces.

Désireux de faciliter ce nécessaire renouvellement, les anciens titulaires de ces postes demeuraient prêts à assister de leur mieux, dans la mesure ou ils le jugeraient utile, les nouveaux élus.

Faute de nouveaux candidats, nous retrouvons les mêmes personnes au Bureau désigné par le Comité. Seules, quelques modifications touchent l'attribution des postes : Monsieur BARRIER, qui demeure Vice-Président, accepte d'ajouter à cette fonction celle de secrétaire-général, Mademoiselle Le BOEDEC, qui désirait se libérer de cette charge, veut bien conserver une partie des tâches qu'elle assumait, comme secrétaire adjointe. Monsieur LIGOT, décidé, lui aussi à résigner sa fonction, l'assumera cependant une année encore à titre provisoire.

Et votre Président, qui écrit des lignes, conscient de ses lacunes, souhaite lui aussi qu'un autre, plus libre de son temps, plus activement mêlé aux activités générales du Mouvement Espérantiste, , pût lui succéder.

Une première condition est à remplir : recruter de nouveaux membres. Comment ? - Tout d'abord en faisant connaître I.K.U.E. à

[illegible]

.../...
tous les catholiques espérantistes membres de cercles, clubs, organisations locales neutres ou spécialisées, et en s'efforçant de leur montrer, comme nous tentions de le faire dans notre précédent bulletin, les raisons profondes et la nécessité de notre existence.

Ensuite, en faisant voir aux catholiques côtoyés dans les mouvements et oeuvres auxquels vous participez les ressources de l'Espéranto, langue de contact direct et personnel avec tous les pays, langue populaire parce que facile, langue riche de possibilités ainsi que le démontre sa littérature traduite ou originale. Langue de culture enfin pour toutes les raisons, qui doit proclamer et faire connaître comme toutes les langues de la Terre, l'Evangile du Seigneur.

Grâce à ces efforts, notre prière universelle pourra continuer à s'élever à l'occasion des assemblées ou congrès, comme la tradition s'en est imposée depuis les début du Mouvement, par la célébration de la Messe, ou les réunions et les échanges de vues, prières, témoignages atteignant des "hommes de bonne volonté", réalisant dans ce cadre universel notre vocation reçue du Divin Maître : être le sel de la terre, annoncer la Bonne Nouvelle à toute créature ?

Si un progrès de recrutement et d'effectifs n'est pas réalisé au cours de cette année, qu'adviendra-t-il de nous ? Continuerons-nous cette action qui se poursuit depuis plus de 55 ans ?
Laisserons-nous le matérialisme s'emparer de tous les efforts des amis de la Langue Internationale ?

Je suis persuadé que nous accepterons pour cette période le mot d'ordre : recruter, rassembler, faire connaître nos buts.

Un peu de dévouement désintéressé, beaucoup d'amour, la volonté d'établir des contacts fraternels entre les Hommes pour contribuer à édifier la Paix du Christ, tels sont les motifs puissants qui doivent nous animer.

Avec la grâce de Dieu et pour son service.

R. Cl. COLAS

---

FAMILIAJ NOVAĴOJ

Korajn gratulojn al Gesinjoroj Pierre ROYER, pro la naskiĝo (24-5-65) de la dua infano, Bruno; kaj al Bruno mem, bonvenon kaj bondezirojn.

---

# ~ ĜENERALA KUNVENO ~

Bedaùrinde, tiun dimanĉon, 23-an de Majo 1965, la ĉeestantaro estis tre malmulnombra "rue de Chabrol", kiam nia Prezidanto S-ro COLAS malfermis la kunvenon. Tamem, ĉiuj kiuj povis, tiun posttagmezon, eskapi el profesiaj, familiaj aù alispecaj devoj, ĉirkaùtable sidis en la ĉambro de U.F.E., kiu estis afable metita sub nian disponon dank'al la gastigantino : Fraùlino PAULIER.

S-ro LIGOT, kasisto, legis sian financan raporton, kies resumo estas jena :

| | | |
|---|---|---|
| Troaĵo de enspezoj sur elspezoj ............. | 192,10 | Fr |
| Enkase je la fino de 1964 .................. | 545,92 | - |
| Ni havas nun ................................ | 738,02 | - |
| Sumo transpagota al IKUE ................... | 11,25 | - |
| Do, sume, en poŝtcekkonto .................. | 749,27 | Fr- |

=============

La Prezidanto gratulas la kasiston pro tiu bona financa rezulto, kaj la ĉeestantaro aprobas la raporton de S-ro LIGOT. Tiu ĉi dankas la F.M.C., en La Houssaye-en-Brie, kontraù malalta pago, ĉiam presas nian bultenon.

Poste, nia ĝenerala sekretariino, Fraùlino LE BOEDEC, kiu de multaj jaroj, majstre kaj sindoneme vivigas la Esperantistan Katolikan Movadon, raportis pri la agado de la Ligo dum la pasinta jaro. Ŝi diris ke :

1/- Ĉiutrimonate kunvenis la komitatanoj, kiuj studis la diversajn problemojn ;

2/- Propagandaj klopodoj estis faritaj :

a) - en katolikaj medioj : 10 Broŝuretoj (Unua Legolibro) senditaj al "Malades Missionnaires",

b) - ĉe Franca Episkoparo : Propagando decidita por informi la francajn episkopojn. Por tio ni mendis 120 ekzemplerojn de "Espero Katolika", "Vojo,Vero,Vivo", kaj "Nova Civito.
La Prezidanto promesis skribi cirkuleron por prezenti nian agadon, nian celon, kaj ni devos aldoni folion por prezenti la lingvon "Esperanto".

3/- Bulteno : Ĝi ĉiam aperas sub la respondeco de S-ro VERON, kiu faras grandan laboron. Ĝi estas sendita al la membroj dank'al la agado de Frato René-Jean MARMOU, F.M.C.-.

4/- Rilatoj kun I.K.U.E. : pere de la estraranoj S-roj COLAS, BESSIERE, kaj de la reprezantanto de E.K. : S-ro VERON.

5/- Morala situacio bona, sed la ĝenerala sekretariino Fraùlino LE BOEDEC kaj la kasisto S-ro LIGOT, kiuj, pro diversaj kaùzoj ne povas daùrigi siajn funkciojn en la Ligo anoncis siajn eksiĝojn .

.../...

.../...

La Prezidanto gratulas Fraŭlinon LE BOEDEC pri tiu morala raporto, aprobita post diskuto, kaj dankas ŝin pro ŝia daŭra sindonemo al nia katolika movado.

Konforme al la tagordo, okazis poste voĉdono por elekti novan komitaton. = 60 membroj de la Ligo voĉdonis. Estis elektitaj : S-roj BARRIER, BESSIERE, COLAS, F-ino LE BOEDEC, S-ro LIGOT, Frato MARMOU, F-ino PAULIER, S-roj ROYER, TEXIER, VERON, kaj S-ino VINCENT.

S-roj VERON kaj LIGOT donacis librojn : unu por loterii inter la ĉeestantaj voĉdonintoj, kaj la alia inter la forestantaj. La Loto atribuis la unuan al F-ino LE BOEDEC, kaj la duan al S-ino VINCENT.

Grava afero estis la malfaçila anstataŭigo de la ĝenerala sekretariino kaj de la kasisto. Ĉe fino de la kunveno, kaj post diskuto, la komitato elektis la jenan estraron :

Prezidanto : S-ro COLAS ,
Vic-prezidanto kaj ĝenerala sekretario : S-ro BARRIER,
Provizora Help-sekretariino : F-ino LE BOEDEC,
Provizora kasisto : S-ro LIGOT.

Dankon al Fraŭlino LE BOEDEC, kiu, cedante al insistaj petoj, konsentis akcepti la postenon de helpsekretariino, dum unu nova jaro; kaj dankon al S-ro LIGOT, kiu same konsentis esti provizora kasisto. Ni povas danki ankaŭ S-ron BARRIER, kiu, restante vic-prezidanto bonvolas anstataŭi Fraŭlinon LE BOEDEC en ŝiaj malfacilaj funkcioj de ĝenerala sekretario.

Komentante sian financan raporton, S-ro LIGOT diris ke 150 membroj estas nepre necesaj al la Ligo. Nuntempe ili estas 111, inter kiuj nur 4 novaj membroj en 1964. Ĉu estas eble ke ĉiu el ni varbu unu membron ? - Tiamaniere nia esperantista katolika movado povos esti viva kaj ... vigla !

R. T. -

==================================================

--- La Dominikaninoj de LOGELBACH. ----

Pro malsano de la religiulino, kiu okupiĝis pri la studado de la nom-etimologio, la Diminikaninoj devis vendi sian sliparon.

Se vi deziras koni la etimologion de via familia nomo, bonvolu de nun vin turni al :

S-ro SACLIER de la BATIE
Chanteloup par
58- COSNE
(Nièvre)

C.C.P.- 735.75.- ORLEANS.-

La kosto estas po 5 Fr-- por ĉiu nomo, kaj vi aldonu afrankita koverto.

S-ro SACLIER de la BATIE ankaŭ estas prezidanto de genealogia asocio kiu eldonas bültenon sub la nomo : "Bulletin d'Entr'aide généalogique".

X. DAUCHEZ.-

==================================================

# Medito por la ferioj

KION mi povus por respondi la demandojn levitajn en la nuro bulteno ?

KIUN mi povus varbi por nia Asocio ?

KIOM DA novaj membroj mi povus trovi ?

KIUN espesrantistan libron mi (re)legu dum miaj ferioj ?

K.t;p;; k.t.p. , ........

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

====================================================================

Ĉu vi konas la monatan gazeton „Nova Civito", el Romo (verko en esperanto) ?

...detaloj aperos en la venontan bultenon !.... (1. oktobro 65)

---

Dépôt légal : 3e trimestre 1965 /// Polycopié par : F.M.C.-
Papier de Presse : N° 34.745- /// Prieuré St-Martin
Directeur-Gérant : Gaston VERON /// LA HOUSSAYE (Seine-et-Marne)
/// 77- TOURNAN-EN-BRIE France

====================================================================